# SVISA ESPERANTO - SOCIETO

## INFORMAS

2/93

Koresp-adr: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich

Red-Telefono: 01/381 77 13 MARTO-APRILO


LUCERNO
HOTELO STEGHOF (Voltastrasse 2)

SVISA ESPERANTO-KONGRESO
13-an kaj 14-an de marto 1993

kaj

ĜENERALA KUNVENO
DE SVISA ESPERANTO-SOCIETO
13-an de marto 1993

La membroj de SES kaj ĉiuj interesatoj pri la esperanto-vivo en Svislando estas kunvokitaj al la Ĝenerala Kunveno de SES, kiu okazos la sabaton 13-an de marto en Lucerno malferme al semajnfina Svisa Esperanto-kongreso.

La detalan programon rigardu en SES INFORMAS 1/93, sur paĝoj 17 kaj 18.

ooOoo

**ANTAŬ-ANONCO**

La tria semajnfina aranĝo de SES ĉi-jare okazos je la 11-a kaj 12-a de september 1993 en CULLY.

ooOoo

## El la Centra Komitato de SES

## DEFINITIVA TAGORDO DE LA ĜENERALA KUNVENO DE SVISA ESPERANTO-SOCIETO, LUCERNO, la 13an de marto 1993

(komparu la publikigon en 'SES informas', n-ro 1/1993, p. 17-18).

Tagordo:

a) **Protokolo de la antaŭa Ĝenerala Kunveno** (aperinta en 'SES informas' 3/92, majo-junio).
b) **Raporto de la Centra Komitato** (aperinta en 'SES informas' 1/93, januaro-februaro).
c) **Financa raporto** (aperinta en 'SES informas' 2/93, marto-aprilo).
d) **Raporto de la kaskontrolantoj** (aperinta en 'SES informas' 2/93, marto-aprilo).
e) **Buĝeto por la jaro 1993 kaj kotizoj por la jaro 1994** (vidu en 'SES informas' 2/93, marto-aprilo).
f) **Elekto de honoraj membroj.**
g) **Proponoj de Lucerna Esperanto-Societo** (komenton de la Estraro de SES vidu en tiu ĉi 'SES informas' 2/93, marto-aprilo).
h) **Diversaĵoj.**

## Komentoj de la Estraro de SES pri la Financa Raporto

Altigo de la kotizo:

La bilanco 1992 pruvas la neceson altigi la kotizon por 1994 por sekvi diversajn prezokreskojn, kiuj rimakriĝas en la rubrikoj 'Literatura Foiro', 'Svisa Esperanto-Societo informas', administrado kaj Argus.

Propaganda enketo:

Sufiĉe sukcesa montriĝis la propaganda enketo ĉe preskaŭ 1200 adresoj registritaj en la komputilo de KCE/SES (v. 'SES informas', n-ro 6/1992, p. 11-12). La kasisto konstatis,

ke la enketo varbis al SES 38 novajn membrojn.

Membrostato:
Videble SES nun estas travivanta ekkreskan periodon. Kelkaj ciferoj ilustru tion:
Membrostato: 1990: 131 membroj; 1991: 156; 1992: 181. Koncerne la donacojn estas ĉiam malfacile ion buĝeti. Ni dankas la 34 donacintojn de 1992 pro ilia malavareco.

Agado 2003
Estas buĝetita nova rubriko titolita 'Agado 2003', kies disvolviĝo dependos ĉefe de la ricevotaj apogoj financaj. En 1992 estis komencita la enketado kaj esplorado pri la svisa esperantistaro kaj pri la svisa Esperanto-movado; tiu ampleksa laboro ebligis ĝis nun kompili pli ol 300 biogramojn pri svisaj esperantistoj, pretigi la detalan priskribon de la historio de la svisa Esperanto-movado kaj malkovri signifajn fontojn dokumentajn (vidu la raporton en 'SES informas', n-ro 6/92, p. 13-15, 17-20). Kroma ĝojiga efiko de tiu aktiveco estis la rekontaktado de pluraj gesamideanoj, kiuj jam delonge perdis sian rilaton kun la svisa Esperanto-movado. Aliaj agadoj ol la Svisa Esperanto-Leksikono/Enciklopedio (provizora titolo; iniciato de Andy Künzli) estas antaŭvidataj, inter alie la eldono de 'mini-gramatiko' (iniciatinto: Claude Gacond).

## Proponoj de Lucerna Esperanto-Societo (LES) kaj respondo de la Estraro de Svisa Esperanto-Societo (SES)

A
"La membraro de LES proponas:
a) prepari nin seriozege por preti aktive transpreni respondecojn pri la enkonduko de Esperanto en Svislando, kiam la svisaj politikaj instancoj decidos pozitive pri la enkonduko;
b) ni instalu svisan laborgrupon, kiu pristudu la ideon kaj ellaboru enkondukscenaron, entenantan:
1-e: tempoplanon; 2-e: instruadplanon; 3-e: instruistarplanon;

4-e: instrumaterialplanon; 5-e: buĝeton por nia agado;
c) la laborgrupo informu regule en 'SES informas' kaj dum la ĝeneralaj asembleoj pri la progresado de niaj komunaj klopodoj."

**Respondo de la Estraro de SES:**
Ni rememorigu, ke sub la prezido de la SES-prezidanto Werner Laederach estis fonditaj en 1967 'Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia' (CDELI) kaj en 1968 Kultura Centro Esperantista (KCE) ĝuste por efektivigi la laboron, kiun proponas la LES-anoj. La LES-propono bedaŭrinde demonstras, ke ĝis nun ne ĉiuj lokaj Esperanto-societoj reale konscias pri la graveco de la laboro, kiun efektivigas CDELI kaj KCE. SES alvokas ĉiujn lokajn Esperanto-societojn kunlabori kun CDELI por dokumentiĝi kaj kun KCE por kleriĝi kaj akiri didaktikan formiĝon. SES konsideras, ke la akcepto de tiu ĉi propono kaj la kreo de nova laborgrupo nur alportus konfuzon en situacio pli kompleksa, ol imagas la LES-anoj. La nunaj gvidantoj de CDELI, direktoro Jacques-André Humair, kaj de KCE, prezidantino Mireille Grosjean-Robert, kompetente plenumas sian rolon; tial ni invitas ĉiujn interesitojn pliintensivigi la kunlaboron kun ili.

B.
"La membraro de LES proponas:
Estonte, ĉiujare ni aranĝu nur ankoraŭ unu dutagan regionan kunvenon: en la 1-a jaro en Tiĉino, en la 2-a jaro en Romandio, en la 3-a jaro en Alemanio."

**Respondo de la Estraro de SES:**
La akcepto de tiu ĉi propono signifus kulturan regreson. Neniu individua esperantisto estas devigata partopreni la kulturajn regionajn semajnfinojn. La kunvenoj allogas la publikon ankaŭ el niaj najbaraj landoj (ekz. la tiĉinan semajnfinon kutime partoprenas ankaŭ italaj gesamideanoj) kaj estas tre gravaj nelaste por la propagando de Esperanto en la koncernaj regionoj (gazetaro, televido, ktp.). Ĉiu konservu la rajton mem decidi laŭ la propraj interesoj kaj financaj ebloj, kiujn aranĝojn li partoprenos. SES volas

konservi la eblon instigi lokajn grupojn kaj esperantistojn regule aranĝi kulturajn renkontiĝojn kaj profitas la okazon danki la kunlaboremulojn pro ilia pozitiva strebado, kiu kontribuas al la fortikigo de la poresperanta laboro.

ooOoo

**U N I K A   Ŝ A N C O**

Estas konate, ke la Svisa Esperanto-Poŝtmarko, eldonita de la Svisa PTT en la jaro 1979, jam delonge plene vendiĝis. Antaŭ kelkaj tagoj ni ricevis oferton de PM-vendejo, kiu intencas vendi parton el sia stoko. Estas vere bona ŝanco akiri ĝin denove. Certe valora propagandilo! Interesuloj turnu sin al la redakcio de ses informas.

ooOoo

**TRENTA ESPERANTO GRUPO INFORMAS**

Nia asocio sukcesis konvinki la agentejon de turisma promocio de la Trenta Regiono (Italio) publikigi du tre belajn broŝuretojn pri vintra kaj somera sezonoj, nature en Esperanto. Niaj argumentoj estas: Esperanto povas helpi ankaŭ en turismaj kaj komercaj aferoj. La broŝuretoj estas senpage riceveblaj ĉe: APT-AZIENDA DI PROMOZIONE TURISTIKA DEL TRENTINO, VIA Sighele 3, I-38100 trento. Por montri, ke tio estas vera, necesas, ke multaj esperantistoj petu la broŝuretojn.

(Bonvolu utiligi tiun-ĉi ŝancon/red).

ooOoo

KCE KULTURA CENTRO ESPERANTISTA
La Chaux-de-Fonds, Svislando

## LA NOVA ĜENERALA PROGRAMO '93 APERIS !

### Ampleksa kultura agado

Fine de januaro aperis la nova Ĝenerala Programo de Kultura Centro Esperantista por la jaro 1993. La programo estas prezentita en bela 28-paĝa broŝuro, konceptita de la Direkta Komitato de KCE kaj de Mario Lépine kaj presita de Kooperativo de Literatura Foiro.

### Semajnfinaj kaj dumsemajnaj kursoj

La kajero enhavas ĉiujn gravajn informojn pri la **studrestadoj** kaj **feri-ebloj** en KCE: ĉiam fine de la monato estas anoncita **studa semajnfino** kun kursoj por komencantoj, progresintoj kaj lertuloj. La instruistoj por tiuj kursoj estas Sonja Brun, Andres Bickel, Jean-Jaques Lavanchy, Claude Gacond, Mireille Grosjean, Andy Künzli, k.a.
Por **lertaj esperantistoj** (kursoj C) prelegas François Degoul pri homaranismo (februaro), Claude Gacond pri la Esperanto-literaturo (marto), d-ro Tazio Carlevaro pri planlingvoj (aprilo), Luigi Barbana vizitas la arbaron (majo), ktp. La ceteraj kursoj estas troveblaj en la Ĝenerala Programo.

### Somera Programo

Ĉiusemajne inter la 6a de julio kaj 14a de aŭgusto okazos **somera Esperanto-kurso** por **komencantoj kaj progresintoj.**
La esencon de la somera programo formas la **prifakaj prelegoj.** Jen kelkaj el ili: Kiel plibonigi sian stilon en

verkado kaj tradukado (Tomasz Chmielik, julio 6-10), Virinoj en la Esperanto-literaturo (d-ro Giorgio Silfer, julio 10-11), Intensiva metodologia kurso por instruistoj (prof. d-ro Duncan Charters, julio 9-17), Pretiĝo al ekzamenoj (Katalin Smidéliusz, julio), Etnismo (Uwe Joachim Moritz, julio 19-23), la Esperanto-disvolviĝo dum unu jarcento (Claude Gacond, aŭgusto 10-14), Survoje al ekolologia moralo (d-ro Lev Medvedev, aŭgusto 10-14), Edukado al pacaj rilatoj interkulturaj (seminario kun Mireille Grosjean, aŭgusto 28-29), Esperanto hodiaŭ, kaj plue? (diskutforumo kun Andy Künzli, oktobro 30-31), ktp.

**Ekplanu vian feriadon jam nun kaj partoprenu en Esperanto-kursoj en Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds. Ĝuu la unikan internacian etoson kaj la kvietan kaj ĉarman naturon de la Ĵurasa Montaro. KCE kaj Gastejo Edmond Privat, kie vi loĝos, atendas vin!**

**Petu nun senpage la Ĝeneralan Programon '93!**
**Adreso: Kultura Centro Esperantista**
**CP 779**
**CH-2301 La Chaux-de-Fonds**
**Tel. 039 26 74 07**

ooOoo

**ICEM-ESPERANTO**

Kooperativa instituto de la moderna lernejo FREINET-PEDAGOGIO invitas vin partopreni en sia renkonto en PARDUBICE ĈEĤIO.
Dato: **14-a ĝis 23-a de julio 1993.**
Petu informojn kaj aliĝilon ĉe:
Daniel David, 44, rue de Lens, F-59190 Hazebrouck.

ooOoo

Ankaŭ ŝerco estas permesata, ĉu ne?
Estis lerneja ferio. La patrino iom laborigas Petron, dirante: Bonvolu iri aĉeti la lakton por hodiaŭ. Petro iris en la laktejon kaj diris: Bonan tagon fraŭlino, mi bezonas unu funton da lakto.
Pardonu, diris la fraŭlino, la lakton oni ne pesas oni mezuras ĝin. Bone, en tiu kazo donu al mi duonan metron!

Al la prezidanto de la
Svisa Konfederacia Konsilio
Sinjoro Adolf OGI
Bundeshaus

3000 Bern

Kriens 1993/01/23

Altestimata Sinjoro Ogi, Prezidanto de la Konfederacia Konsilio,

okaze de via elektiĝo kiel prezidanto de la Svisa Konfederacio 1993, nome de la Estraro de Svisa Esperanto-Societo mi ŝatus transdoni mian gratulon. Ni subtenas vian eŭropan kaj internacian engaĝiĝon favore al Svislando kaj deziras al vi en la plenumo de via nova alta kaj signifa politika ofico multan sukceson.

Ĉi-okaze mi permesas min esprimi mian bedaŭron pri la decido de Svisa Radio Internacia (Berno) antaŭ nelonge aboli esperanton kiel elsendolingvo. Mi esperas, ke malgraŭ la ŝparpolitiko de tiu radiostacio kaj malgraŭ la novaj programprioritatoj, tiu ĉi decido povos esti nuligita. La esperanto-elsendoj ĉe SRI ekzistis depost 1946 kaj ĝuis grandan popularecon en multaj landoj de la mondo. Eventuala repreno de tiuj disaŭdigoj estus ankaŭ signo de la serioza preteco, atribui pli da atento al la internacia lingva problemo.

Dankante al vi pro la konsidero de tiuj ĉi linioj, mi petas vin, akcepti la certigon de nia altestimo.

Kun afablaj salutoj

Por la Estraro de SES

lic. phil. Andy E. KÜNZLI
sekretario SES

Rimarko: La historia skizo pri la esperanto-programo de Svisa Radio Internacia, antaŭvidita por 'SES informas', aperos en venonta eldono de 'Literatura Foiro'.

**PRO ESPERANTO** (Postfach 28 A-1014 Wien)

## NOVAJ LIBROJ

La kunlaborantoj de la mikro-eldonejeto PRO ESPERANTO ĜOJAS PREZENTI TRI NOVAJN librojn kaj unu broŝuron. Dum en la komenco de nia agado ni ĉefe aktivis sur la tereno de la represoj, nun ni metas pli fortan akcenton al la eldono de ankoraŭ ne-aperintaj verkoj. Eta sensacio estas la fakto, ke publikiĝis la lasta poemaro de Kolomano Kalocsay. Kaj nova talento aperis en la Esperanta Literaturo: Trevor Steele, kies novelaro baziĝas sur la kompreno de ne-eŭropa kulturo, per tio starante en la homanarisma tradicio de Zamenhof.

Tre proksime de ni nuntempe okazas milit-krimoj nekredeblaj: torturado kaj masakrado de homoj, kies sola kulpo estas aparteni al certa etno kaj certa religio. La homaro ne lernis la terurajn lecionojn de la historio. Kaj multaj eŭropaj landoj indiferente observas... Tia Eŭropo ne estas la nia! Ne estas la tempo de belaj kaj dolĉaj vortoj, sed ni konsciu: La konceptoj de Zamenhof perdis nenion de sia aktualeco. Esperanto estas kaj restas alia ebla modelo de la mondo, kiu baziĝas sur egaleco kaj kompreno kaj tolero de fremdaj kulturoj. Spomenka Ŝtimec, kroatino, per sia libro "GEOGRAFIO DE MIAJ MEMOROJ" montras al ni, kio estas vivata esperantismo meze en mondo egoisma kaj - freneza.

Pluaj titoloj:
Steele Trevor: Memori kaj forgesi. (3-4 noveloj el la norda montaro.

Piron Claude: "Esperanto el la vidpunkto de verkisto". (Dua eldono sur luksa papero.)

Por garantii la daŭrigon de sia eldona agado, PRO ESPERANTO devas iri novajn vojojn. kaj pro tio ni direktas al vi la jenan oferton:

-Se vi decidas aŭtomate aĉeti ĉiun nove ape-

rantan titolon de PRO ESPERANTO, vi ne pagos sendokostojn.

-Ekde la momento, kiam 30 aliaj personoj faros same, vi ricevos 10%-an rabaton. Ekde 60 personoj la rabato altiĝas al 20%, kaj ekde 90 personoj al 33.33%! Kvankam la nombro de la unuaj tridek personoj ankoraŭ ne estas plene atingita, JAM NUN VI RICEVAS DEKPROCENTAN RABATON!

-Ni devas malrapidigi nian eldon-ritmon pro manko de mono. Do, ne timu, ke ni devigos vin aĉeti tro da libroj.

-Se vi ne loĝas en Aŭstrio, ni faciligas al vi la pagadon: Vi ne unuope pagos la librojn, sed vi ricevos proksimume nur unu aŭ dufoje en la jaro kolektivan fakturon, pageblan al nia UEA-konto aŭ al nia poŝtĉekkonto en Wien.

Se vi estas aŭtomata mendanto de la libroj de PRO ESPERANTO, vi ricevas rabaton ankaŭ por la jam aperintaj libroj kaj broŝuroj kaj krome ne pagas sendokostojn.

La librokatalogo de PRO ESPERANTO estas ricevebla ĉe

PRO ESPERANTO
poŝtfako 28
A-1014 WIEN

ooOoo

**KORESPONDPETO**

Jonny Steffensen (61-jara), Lövasveien 42E N-2830 Raufoss Norvegio. Mi estis kontoristo kaj loĝas, kune kun mia edzino, 112 km norde de Oslo. Mi kolektas BK kaj PM. Ankaŭ turismo kaj lingvoj interesas min. Mi tre ĝojus havi korespondanton en Svislando.

ooOoo

## I N F O R M O J  p r i  U E A

Ciu Esperantisto povas fariĝi membro de UEA. Kiel tia membro oni rajtas uzi la Delegitan Reton, kiu funkcias en proksimume 70 landoj en ĉiuj kontinentoj. Krome individuaj membroj de UEA povas fariĝi lokaj kaj fakaj delegitoj. Ekzistas diversaj membrokategorioj, precipe membro kun jarlibro kaj membro-abonanto. Pri la kotizoj informas vin la landodelegito kaj kotizperanto de UEA.
UEA klopodas disvastigi kaj utiligi Esperanton kaj edukas al tutmonda konscio. Tio estas ebla nur, se UEA havas multegajn individuajn membrojn, kiuj kontribuas per kotizoj. Ju pli multaj homoj parolas kaj skribas Esperanton, des pli praktike valora kaj kulture riĉa ĝi fariĝas. UEA regule okazigas la tre konatajn Universalajn Kongresojn. Ankaŭ pri ili kaj la kongreskotizoj informas vin la landodelegito.
Por havi kotiztabelon kaj pli precizajn informojn skribu al Niklaus Weiss, Sagistrasse 20, 6300 Zug. Sciu tamen, ke tiu-ĉi adreso validas nur ĝis fine de aŭgusto 1993. Poste aliulo fariĝos landodelegito kaj kotizperanto de UEA por Svisujo. Mi dankas al ĉiuj individuaj membroj de UEA pro la fido, kiun ili estas donintaj al mi dum la pasintaj sep jaroj.

ooOoo

## MORTANONCO

Nur nun ni ricevis la informon, ke nia longjara fidela membro, René Zollinger, mortis la 13-an de oktobro 1992 en La Chaux-de-Fonds. La mortinto estis depost pli ol 60 jaroj membro de SES kaj multe laboris por la lingvo internacia. Mia edzino kaj mi ekkonatiĝis kun li en la jaro 1945.
René Zollinger montriĝis ĉiam kiel bona amiko kaj laborema esperantisto. Kune kun Otto Walder li multe faris por la bono de nia landa societo. Li restas sendube ĉe ĉiuj, kiuj konis lin, en bona kaj danka rememoro.-FL-

ooOoo

SVISA ESPERANTO-SOCIETO

# B I L A N C O  1 9 9 2

| Jarkalkulo | Buĝeto 92 | Enspezoj | Buĝeto 93 |
|---|---|---|---|
| Membrokotizoj | 6'500.- | 6'355.- | 7'500.- |
| Abonoj SI sen membreco | 150.- | 50.- | 500.- |
| Donacoj | 1'000.- | 1'381.- | 1'200.- |
| Interezoj SKA kaj GEP malnetaj | 2'600.- | 2'682.30 | 2'500.- |
| Agado 2003 | - | - | 1'000.- |
| Enspez-sumo | 10'250.- | 10'468.30 | 12'700.- |

| | | Elspezoj | |
|---|---|---|---|
| Literatura Foiro LF | 4'000.- | 4'767.- | 5'000.- |
| Svisa Esperanto-Societo Informas SI | 1'600.- | 1'779.90 | 2'200.- |
| UEA kotizoj | 80.- | 169.- | 150.- |
| Propagando, Varbado | 5'000.- | 3'215.55 | 5'000.- |
| CK administrado | 2'000.- | 2'490.25 | 2'500.- |
| Kunvenoj ĝeneralaj kaj regionaj | 1'500.- | 343.- | 1'000.- |
| Bankspezoj kaj Diversaĵoj | 300.- | 225.50 | 300.- |
| Argus | 1'000.- | 1'187.80 | 1'200.- |
| Subvencio al JES | 1'000.- | 1'000.- | 1'000.- |
| Agado 2003 | - | - | 1'000.- |
| Elspez-sumo | 16'480.- | 15'178.- | 19'350.- |
| GAJNO + / PERDO - | - 6'230.- | - 4'709.70 | - 6'650.- |

| Kapitalo (SKA kaj GEP) | Aktivoj | Pasivoj |
|---|---|---|
| Gastejo Edm. Privat, konto 079 | 43'843.70 | |
| Inventaro | 1.- | |

| | | Aktivoj | Pasivoj |
|---|---|---|---|
| SKA konto kuranta | | 18'016.10 | |
| Junulara vojaĝfonduso | | | 9.50 |
| SKA k. GEP antic. impostoj, bonhavo ĉe ESV | | 938.80 | |
| Transaj eroj aktivaj k. pasivaj | | | 1'050.- |
| Kapitalo je 01.01.92: | 66'199.80 | | |
| Plus elpreno de pas. junul. vojaĝfond. | + 250.- | | |
| Minus PERDO kiel supre | - 4'709.70 | | |
| Kapitalo je 31.12.92: | 61'740.10 | | 61'740.10 |
| | | 62'799.60 | 62'799.60 |

| Reserva kapitalo (SVB) | | Aktivoj | Pasivoj |
|---|---|---|---|
| SVB depona konto: Trans. al nova ŝparkonto | | 00'000.00 | |
| SVB ŝparkono (nova) | | 11'274.15 | |
| SVB antic. impostoj, bonhavo ĉe ESV | | 187.20 | |
| Reserva kapitalo je 01.01.92: | 10'929.75 | | |
| Plus interezoj malnetaj | + 534.90 | | |
| Minus bankspezoj | - 3.30 | | |
| Reserva kapitalo je 31.12.92: | 11'461.35 | | 11'461.35 |
| | | 11'461.35 | 11'461.35 |

La kasisto: Ernst von MAY, Oberuzwil, 92-12-31

E. v. May

## EKSTERLANDAJ ESPERANTO-RENKONTIĜOJ

E Ù R O P O :

### 41-a KULTURA SEMAJNO DE SAARLANDA ESPERANTO-LIGO / SEL

okazos de la 7-a ĝis la 9-a de majo 1993 laŭ tradicio en la KARDINAL-WENDEL-DOMO en D-6650 HOMBURGO.

Funkcios:

1. Enkonduka kurso por komencantoj, estrota de Karl Burger.
2. Parolaj kaj legaj ekzercoj por progresantoj. Kursestro estos Kreŝimir Barkociĉ de Parizo.
3. Stilistikaj kaj literaturaj ekzercoj pri kaj ĉirkaŭ vortoj de Andreo Cseh. Kursestro estos Eddy Borsboom, Nederlando.
4. Seminario por spertuloj.

Ni tre ĝojas, ke ĉi-foje ni havos kiel gaston sinjoron Claude Piron, kiu prelegos pri LINGVO KAJ ESPERANTO EL PSIKOLOGIA VIDPUNKTO:

Saarlanda Esperanto-ligo/SEL, Querstrasse 11 D-6607 Quierschied. (Tel: 06897/62142.

La sekretariisto:
H. Fillmann

ooOoo

La Esperantoklubo de STASZOW (norde de Krakovo) invitas al la 7-aj ESPERANTAJ TAGOJ DE STASZOW, POLLANDO.

Dato: 27-a ĝis 30-a de majo 1993.

INFORMOJ: Esperantoklubo, Parkova 6,
PL-28-200 Staszow Pollando.

ooOoo

## 9-a PRINTEMPA SEMAJNO INTERNACIA (9-a PSI)

okazos de la 9-a de aprilo - 16-a de aprilo 93 en Oberbernhards/Rhön apud Fulda/Heslando.

Ekde 1985 Germana Esperanto-Asocio organizas ĉiujare dum pasko ferian semajnon sub la titolo:

**PRINTEMPA SEMAJNO INTERNACIA/PSI**

En 1992 partoprenis en ĝi ĉirkaŭ 100 personoj, inter ili ĉirkaŭ 30 infanoj. La aranĝo ĉefe direktas sin al la mezaĝa generacio -kun aŭ sen infanoj-sed ankaŭ ali-aĝuloj, kiuj harmonias kun infanoj, estas tre bonvenaj. Ĉi-foje ni ankaŭ planas apartan prizorgon de grupo da 10-ĝis 14-jaruloj.
Kompreneble ĝuste inter la familianoj estas ofte kelkaj, kiuj (ankoraŭ) ne parolas Esperanton. Por ili tial okazos lingvokursoj, sed ankaŭ por progresintoj kaj flueparolantoj ni antaŭvidas apartajn kursojn. Krome la programon fiksos la ideoj de la partoprenantoj; antaŭvidataj estas ekskursoj, slojdado, kantoj, ludoj, lumbildprelegoj ktp.
Sed ĉio sen streĉo! Simpla kunestado kaj babilado daŭre eblos. Konatiĝu kun la belega regiono kaj praktiku Esperanton en feria ĉirkaŭo.
Malgraŭ la tre favoraj kotizoj la domo estas sufiĉe luksa. Ĉar ni nur disponos pri 120 lokoj, laŭeble baldaŭ aliĝu. Petu pliajn informojn de la komisiitoj de GEA por PSI.
Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweng-str. 11, D/W-5483 Bad Neuenahr-Ahrweiler, Germanujo.
Tel: 02641/4885 aŭ telefakso 02641/4014. -WB-

ooOoo

## XV-a JUBILEA ĈEBALTA ESPERANRISTA PRINTEMPO

Kun granda plezuro mi sciigas al vi, ke la POLA ESPERANTO-ASOCIO, Filio en Koszalin , estas organizanta la XV-an JUBILEAN ĈEBALTAN ESPERANTISTAN PRINTEMPON en MIELNO, de la **6-a ĝis la 12-a de junio 1993.**
Mi kore invitas vin kaj viajn gesamideanojn partopreni nian interesan aranĝon.
Mi esperas, ke dank' al via helpo, venos al MIELNO (perlo de polaj ripozejoj) almenaŭ kelkaj esperantistoj el via urbo ( lando ), kiuj agrabligos nian JUBILEAN RENKONTIĜON ĉe la Balta Maro.

-POLA ESPERANTO-ASOCIO
SKR: POCZT 30.75-016
KOSZALIN

Rimarko de la red. de SES INFORMAS:
Aliĝilo kaj detala informo pri la programo estas haveblaj ĉe la redakcio SES INFORMAS.

-Red. FL-

ooOoo

**MALTA ESPERANTO-SOCIETO**

invitas vin partopreni en la

KVARA INTERNACIA TURISMA SEMAJNO EN MALTO

de la 4-a ĝis la 10-a de septembro 1993

Prospektoj kaj aliĝiloj haveblaj ĉe:

Malta Esperanto-Societo
P.O. Box 142
Valletta CMR 01
MALTA.

**INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO**

de la 21-a ĝis la 28-a de aŭgusto 1993 en alpoj 1100 m super la marnivelo, en vilaĝeto **HABÈRES-POCHE**, meze de kamparoj, 25 km sude de Thonon.
Ni proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipovon pri Esperanto.
Ni havas diversnivelajn kursojn gvidatajn de eminentaj geinstruistoj, inter kiuj Pierre Babin, Daniel Moirand, Alain Favre.
Kiel ĉiujare vi trovos vere internacian etoson. Ankaù.... banado, porpiedirantaj promenadoj, ekskursoj, vizitoj, kantado, interesaj vesperkunvenoj kaj bona manĝo ĝojigos vin.
Tre modesta restadkosto; restadejo taŭgas por rulseĝuloj; eblas tendumi proksime.

**ALIĜOJ KAJ INFORMOJ:**
Centre Culturel Esperanto de Montpellier, Rue du Docteur 5, F-34000 Montpellier. Tel: 33 67 54 15 43.

Sama aranĝo okazos 4-a ĝis 11-a de septembro 1993 ĉe mediteranea marbordo, en havenurbo **SÈTE**, 30 km okcidente de Montpellier.

-Dr. Yvette Vierne-

oOo

**HISPANIO**

9-a ĝis 16-a de oktobro 1993 Sant Cugat Del Valles (Barcelono):

**1-a INRERNACIA KULTURA KAJ TURISMA SEMAJNO.**
Informoj ĉe: Hispana Esperanta Fervojista Asocio, poŝtfako 15027, E-08080 Barcelono, Katalunio, Hispanio. -L.M.Hernandez Yzal-

ooOoo

## INFANA KONGRESETO EN LA UK EN VALENCIO 1993

Karaj gesamideanoj,
Dum la venonta UNIVERSALA KONGRESO EN VALENCIO/HISPANUJO okazos en najbara urbeto la 28-a **INTERNACIA INFANA KONGRESETO.** Ĉar oni ofte supozas, ke tia aranĝo estas nur por denaskaj Esperantistetoj, mi emfazas ĉi-tie, ke tiuj, kiuj plej multe profitas de tiaj renkontiĝoj, estas geknaboj, kiuj eklernis la lingvon dum la antaŭa jaro.

Se vi mem konas inteligentan, aventureman infanon, kial ne peti de mi informojn pri la venonta IIK? Ĝi promesas fariĝi la ĝis nun plej bona! Kaj eĉ, se vi ne konas tian infanon, ĉu vi pretus arigi mondonacojn por subvencii la ĉeeston de iu alia infano el via lando?

Infanoj, kiuj parolas Esperanton, estas la plej bela propagandilo, ĉu ne?

Elkore via
Christopher Fettes
ĉeforganizanto de la IIKoj
St. Columba's College
Dublin 16, Irlando
(Telefakso:-353-1-936655)

ooOoo

## LA 48-a KONGRESO DE SAT-AMIKARO

estiĝos de la 9-a ĝis la 13-a de aprilo 1993 en Hérouville Saint Clair, apud CAEN, Francio. Informoj kaj aliĝiloj al: Yves Nicolas 17-37 Quartier du Bois, F-14200 Hérouville Saint Clair.

-Jean Gibaux-

ooOoo



# SKOLTO '93
SKOLTO '93
SKOLTO '93
SKOLTO '93
SKOLTO '93

**INTERNACIA SKOLTA TENDARO** organizita de SEL

Skolta Esperanto-Ligo/SEL invitas ĉiujn geskoltojn partopreni la internacian skoltan tendaron SKOLTO 93, kiu estas aranĝata en ĉeĥoslovakio de la 3-a ĝis la 13-a de aŭgusto 1993.
La tendaro okazos en regiono de la urbo Opava, kiu estas grava kultura centro kaj iama ĉefurbo de ĉeĥa Silezio. La tendaro troviĝas en belega naturo de montaro Oderské vrchy (odraj montoj) en valo de la rivero Odra, ĉe malgranda digolago.
Ĉar la ĉirkaŭaĵo de la tendaro estis en la pasinteco fermita militareo, la naturo estas tre konservita. Por la tendaro estos preparitaj, kunlabore de la ĉeĥaj, polaj kaj belgaj skoltoj, tipaj skoltaj programoj kaj aktivecoj. Dum la tendaro ankaŭ okazos ekskursoj en montaron Jeseniky (plej alta monto 1492 m) kaj instruado de Esperanto en kursoj por komencantoj, progresintoj kaj konversacia kurso. Ĉiu interesulo ricevos pli detalajn informojn (programon, atingovojojn, mapojn de la regiono, aliĝilon, manieron de kotizpago ktp) kaj post aliĝo ĉiujn informilojn.
Aĝo de partoprenontoj estas limigita ekde 10 jaroj. La tendarkotizo por skoltoj de okcidenta Eŭropo estas 4500 BF (belgaj Fr.), por skoltoj de ekssocialismaj landoj 1200 ĉeĥaj kronoj. Pli detalajn informojn kaj aliĝilon postulu ĉe:
Arie Bouman Driesdreef 8 B-9030 Gent aŭ Jan Piŝala E. Krásnohorské 1 CS-746 01 Opava.

ooOoo

Ni ricevis la suban artikolon kun la peto publikigi ĝin en SES INFORMAS: (red)

**IKEL SEMINARIOS EN SVISLANDO**

**E T N I S M O**

**FUNDAMENTEROJ; PROBLEMOJ KAJ PERSPEKTIVOJ**

Kadre de tiu-ĉi ĉeftemo, manpleno da kontribuantoj prelegos kaj/aŭ gvidos debatojn pri teoriaj kaj praktikaj aspektoj:

**KIO KAJ KIA ESTAS ETNO? - KIUJ RILATOJ EKZISTAS INTER ETNOJ KAJ NACIOJ? - ĈU ONI POVAS EKSETNANIĜI? - KIO OKAZAS EN LA BALKANA DUONINSULO KAJ EN ALIAJ KONFLIKTOZONOJ? - KIUN ROLON LUDAS AŬ LUDU IKEL?**

La seminario okazos de la 19-a (vespere)ĝis la 23-a (matene) de julio 1993 en la ejoj de Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds (Svislando).

La kotizoj, kiuj kovras tranoktadon, manĝaĵojn kaj programon, estas jenaj por unu persono: 300 SFR en 4-lita ĉambro, 340 SFR en dulita ĉambro, 420 SFR en 1-lita ĉambro.

Aliĝante rekte ĉe KCE poŝtfako 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, bonvolu indiki por ĉiu persono: familian kaj individuan nomojn,kompletan adreson (kun tel-n-ro), naskiĝjaron, elekton de dormeja kategorio kaj "IKEL"-seminario. Aliĝo validas nur se por ĉiu persono estas antaŭpagitaj po 150 SFR al KCE, poŝtĝirkonto 23-2921-8, poŝtoficejo la Chaux-de-Fonds, kun mencio "antaŭpago: IKEL-seminario".

Pliajn informojn petu ĉe KCE aŭ ĉe
IKEL Im Römerfeld 44 D-W-5180 Eschweiler.

-Uwe Joachim Moritz, prezidanto-

ooOoo

ESPERANTO-KONFERENCO
EN HUNGARIO
KONDOROS
17-24 JUL 93



temo
KIAL PAROLI
ESPERANTON ?
programo
PRELEGOJ, DEBATOJ
KURSOJ
OSIEK-PREMIO
SIMPOZIOJ
TEATRAĴOJ, DISTROJ
LIBROSERVO
24-27 julio
TRI TAGOJ EN
BUDAPEŜTO
informoj, aliĝoj
Eric LAUBACHER
1, rue des Vosges
F-78180 MONTIGNY-LE-
BRETONNEUX
Francujo
tel. (1) 30 96 67 91

## OSIEK-PREMIO 1992

Ĉi-jare la OSIEK-anoj proponis 7 librojn premiindajn, prezentitaj en la gazeto n-ro 41 (15.6.92). La 23-an de julio 92, dum la internacia Esperanto-konferenco en Ateno/Grekio, per dubla sekreta voĉdonado, la OSIEK-premio estis atribuita al

Ebbe **VILBORG**

pro lia verko

**ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO;**

kies 3-a volumo aperis en aŭtuno 1992. La premio, kies nuna valoro estas 300 ekuoj, estas laŭstatute rekompenco al verko nebeletra.



Ebbe VILBORG, krokizo de Megumie KOMAMURA (el *LG*41)

## G R U P A J   I N F O R M O J

ESPERANTO-SOCIETO BASEL: En restoracio Mägd.

25.3.20.00h Monata kunveno en Holbeinstube: Prelego kun lumbildoj de s-ino Nicole Béroud-Focke pri vizito ĉe Esperantistoj en Ĉekoslowakio.

22.4.20.00h Monata kunveno en restoracio Mägd, en la Bebbistube. Ni tradukos kune kaj korektos ludon (kvarteton), kion ni poste provos.

BELLINZONA: ĉiam en Viale Motta 32:
6.3.17.00h (Sabato) kaj Sabaton 3.4.17.00h.

ESPERANTO-SOCIETO BERN:
En restoracio Al Forno, Spitalgasse 37.
2.3.19.30h kaj 6.4.19.30h.

ESPERANTO-SOCIETO BIEL:
En restoracio Mandarin, Dufourstrasse 41.
17.30-18.30h ĉiun vendredon. Vizitu nin.

ESPERANTO-SOCIETO "LA STELO" Genève.
En Institute National Genève.
26.3.20.00h kaj 30.4.20.00h.

LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO:
26.2.20.00h ĜENERALA KUNVENO
10.3.14.00h Paroliga kunveno en restoracio Big Ben.
13.+14.3. (sabato/dimanĉo) Svisa Esperanto-kongreso en hotelo Steghof, Volta-Strasse 2.
25.3.20.00h (ĵaŭdo) La antaŭkongreso 1992 en Prago.
14.4.14.00h (merkredo) Paroliga kunveno en Big Ben.
15.4.20.00h En restoracio Simplon: "ESPERANTO EN SVISLANDO". Ni kompilas demandojn por SES.

ESPERANTOKLUBO WIL: En restoracio Schweizerhof.
10.3.20.00h S-ro Andy Künzli parolos pri:
a) SVISA ESPERANTO-LEKSIKONO.
b) INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTO EN CARA IMPERIO KAJ Sovetunio.

7.4.20.00 Ni legos Literaturan Foiron. Gvidos E. von May. Kunprenu LF.

ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:

| | |
|---|---|
| 8.3.19.00h | Monata kunveno en Karl der Grosse. Prelegos s-ro Gacond pri: AL VERA HOMECO. |
| 29.3.19.00h | Libera kunveno en kafejo Valentino münster-gasse 4 (supre de Grossmünster). |
| 5.4.19.00h | Monata kunveno en Karl der Grosse. Filmo en Esperanto: "En Eùropo ie". |
| 26.4.19.00h | Libera kunveno en kafejo Valentino. |
| 29.4.17.00h | Varbostando en Bahnhofstrasse. informas: Telefono 156 54 34. |

**ATENTU:** Pro pasko-lundo (12.4.) la MK okazos unu se-semajnon pli frue (5.4.)

ooOoo

## D O N A C O J

En la duona duono de la jaro 1992, 9.7.92 - 24.12.92, SES ricevis la jenajn donacojn:

M. Moreillon 26.-, W. Schaufelberger 5.- W. Giannini 70.-, E. Rohner 20.-, Thomas Honegger 50.-, W. Basler 25.-, Claude Ga-cond 400.-, Antoinette Blanc 100.-, D. Lam-bercy 20.- .

La estraro de SES tutkore dankas pro tiuj valoraj kontribuoj.

ooOoo

## AL ĈIUJ RICEVANTOJ DE SES INFORMAS

La unua numero 1993 venis al vi sen numeri-go 1/93 kaj sen indiko de la monatoj janua-ro-februaro. Mi petas ĉiujn mem enskribi tion. Estis ampleksa laboro kaj diversaj tekstoj atingis min nur en la plej lasta momento. Do, mi devis urĝi por respekti la aperdaton. En tiu rapideco okazis la eraro. Mi petas pri pardono. -FL-

ooOoo

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA



**EKZAMENOJ EN KULTURA CENTRO ESPERANTISTA**/KCE

Dum la somero 1993 eblos ekzameniĝi en KCE laŭ la normoj de UEA-ILEI pri lingvokapablo (elementa kaj meza niveloj) kaj pri instru-kapablo. Detaloj troviĝas en la ĝenerala programo 1993 de KCE, aŭ vi jam ricevis ĝin, aŭ vi petu pri ĝi en KCE:

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA
Poŝtfako 779
CH-2301 La Chaux-de-Fonds
Tel: 039/26 74 07

ooOoo

**Redaktfino** de SES INFORMAS n-ro 3/93 estas la 16-a de aprilo 1993.

ooOoo